# Protokolo

## Komitatkunveno de TEJO

15 julio 2023

| | |
|---|---|
| **1a sesio** | 10:00-12:00 UTC |

| # | Tagordero | Subtemoj | Daŭro |
|---|---|---|---|
| 1 | Malfermo | Klarigo de proceduroj | 15 min |
| | | Elekto de kunsidestro | |
| | | Elekto de propona teamo | |
| 2 | Tagordo | Fikso de cetera tagordo | 10 min |
| 3 | Financa Raporto | Prezento de la Financa Raporto por komitata aprobo | 45 min |
| 4 | Prezento de la kandidatoj por la Estraro | Resumo raporto de Elekta Komisiono | 50 min |
| | | Prezento de kandidato(j) | |
| | | Voĉdonado pri kvantoj da estraranoj kaj vicprezidantoj | |

La sesio estas elsendata en YouTube: https://www.youtube.com/watch?v=W6l0FE0I1yg

La 1-a sesio komenciĝas je 10:10 UTC pro teknikaj problemoj kun la funkciigo de la reta elsendo en YouTube.

**1. Malfermo**

La Ĝenerala Sekretario **Tobiasz** bonvenigas la ĉeestantajn komitatanojn kaj gastojn. Li klarigas, ke la persono, kiun la Estraro volis proponi kiel kunsidestron, ne povas ĉeesti la kunvenon. Tial li proponas Rafał Darasz kiel kunsidestron por la unua sesio (li ne povos ĉeesti la duan). Tobiasz montras la proponatan tagordon.

**1.1. Klarigo de proceduroj**

**Tobiasz** klarigas la procedurojn de reta komitatkunveno: pri la estrado de la kunsido kaj pri la voĉdonoj.

**1.2. Elekto de kunsidestro**

**Tobiasz** prezentas **Rafał Darasz** kaj proponas lin kiel kunsidestron por la unua sesio de la komitatkunveno.

*La Komitato elektas Rafał Darasz kiel kunsidestron por la unua sesio de la nuna komitatkunveno.*
18 personoj voĉdonas jese, neniu voĉdonas nee, neniu sin detenas.
La propono estas akceptita.

**1.3. Elekto de propona teamo**
**Tobiasz** petas sinproponojn por fariĝi anoj de la propona teamo. Li rememorigas, ke necesas almenaŭ du personoj, kiuj devas esti komitatanoj, sed ne estraranoj, nek personoj, kiuj estos kandidatoj en venontaj voĉdonoj aŭ elektoj. **Oscar Hernández** kaj **Wojciech "Wojtek" Oreszczuk** sin proponas.

*La Komitato elektas Oscar Hernandez kaj Wojciech Oreszczuk kiel membrojn de la Propona Teamo por la nuna komitatkunveno.*
19 personoj voĉdonas jese, neniu voĉdonas nee, neniu sin detenas
La propono estas akceptita.

**2. Fikso de cetera tagordo**
**Tobiasz** montras la proponatan tagordon. Komitatkunvenoj julio + IJK 2023 / Tagordo
La Prezidanto **Albert Stalin Garrido** klarigas la forigon de la programero pri ĝisdatigo de la estraraj fakoj. **Ana Ribeiro** proponas aldonon de tagordero fine de la dua sesio pri Aktivula Trejnado, rilate al la proponoj, kiujn ŝi sendis al la komitata listo antaŭ kelkaj semajnoj.

*La Komitato decidas aldoni novan tagorderon fine de la dua sesio pri Aktivula Trejnado kaj aprobas la ceteran tagordon kiel prezentite en la koncerna dokumento.*
18 personoj voĉdonas jese, neniu voĉdonas nee, 2 personoj sin detenas
La propono estas akceptita.

**3. Prezento de la financa raporto por komitata aprobo**
La Kasisto **Wilson** prezentas la financan raporton, kiu antaŭe estis sendita al la komitata listo. Li klarigas ĉiun pozicion kaj ĝian devenon. La oficisto **Karlos Peskera Alonso** atentigas, ke kaze de realigitaj projektoj, TEJO ne ricevas 100% de la sumo rekte, sed parton nur post la aprobo de la projekta raporto. Li ankaŭ demandas pri la deveno de la sumo pri IJK kaj Wilson klarigas la sumon. Komitatano **Miguel Bento** demandas, ĉu laŭ librotenado la du sumoj, kiuj troviĝas en la financa raporto (pri la sumaj elspezoj kaj la diferenco inter la bonhavo komence de 2022 kaj fine de 2022) devus esti samaj, ĉar ili signife malsamas. **Wilson** klarigas, ke tiuj sumoj ne signifas la samon, do ne devas esti samaj. Samtempe Wilson rimarkas eraron en unu pozicio de la financa raporto. **Miguel** demandas pri la preciza sumo de la deficito de 2022, **Wilson** respondas, ke temas pri 47.901,06 eŭroj. **Tobiasz** demandas al Wilson, ĝis kiam li povas prepari korektitan version de la financa raporto, sen la rimarkita eraro. **Wilson** respondas, ke li nun estas preparanta la korektitan version kaj sendos ĝin al la komitata listo post momento. **Tobiasz** proponas, ke oni konsideru la nunan kunsidon

la debata fazo, sed ke oni voĉdonu rete post la kunveno por ne devi tuj voĉdoni pri ĵus sendita dokumento. **Michál Matúšov (KuboF)** subtenas la proponon.

> *La Komitato taskas al la Kasisto rekontrolon kaj korekton de la Financa Raporto kaj decidas voĉdoni ĝian aprobon rete.*
> 19 personoj voĉdonas jese, neniu voĉdonas nee, neniu sin detenas
> La propono estas akceptita.

**Wilson** rimarkigas, ke la korektita raporto estis ĵus sendita al la komitata listo.

**3'. Prezento pri la administra subvencio (komenco)**
Estrarano **Patricio Iglesias** demandas al la kunsidestro, ĉu li preferas ke li faru la prezenton nun aŭ fine de la kunveno, en ceteraĵoj. **Tobiasz** atentigas, ke pro la planitaj voĉdonoj inter la sesioj, tiu ĉi sesio prefere finiĝu laŭplane. **Rafal** konsentas, ke Patricio faru la prezenton nun, sed petas, ke li provu esti konciza.

**Patricio** montras la lumbildojn Financaj defioj de TEJO - KoKu - 15/VII/2023 kaj komence dankas la personojn, kiujn kontribuis al ĝia kreiĝo. La celo de la prezento estas montri, kiel nun TEJO dependas de subvencioj bazitaj en Eŭropo, kio devigas ĝin agi en Eŭropo. Li klarigas ankaŭ kelkajn regulojn de la administra subvencio kaj kiel ĝi funkcias rilate al la nuna stato de TEJO. Li atentigas ankaŭ pri la minimuma salajro en Nederlando kaj ĝia kreskanta sumo.

En tiu momento **Rafał** interrompas la prezenton pro manko de tempo kaj prefero plene realigi la tagorderon pri la prezento de la kandidatoj por la Estraro en tiu ĉi sesio.

**4. Prezento de la kandidatoj por la Estraro**
**4.1. Resuma raporto de la Elekta Komisiono**
Membro de la Elekta Komisiono **Łukasz Żebrowski** mallonge resumas la raporton de la EK pli frue sendita al la komitata listo. Li rememorigas, ke estas tri proponoj pri la estraro: 5-, 6-aŭ 7-kapa, kun po unu kandidato por ĉiu posteno. Li priparolas, kiom malfacile estis konvinki personojn kandidatiĝi. La EK parolis kun pli-malpli 30 personoj, sed nur 6 personoj konsentis kandidatiĝi. **Lukasz** atentigas, ke la malgranda nombro ne signifas, ke mankas aktivuloj en TEJO, sed ke ĉi-jare malmultaj el ili pretis prezenti sin kandidatoj por la Estraro. Poste **Lukasz** proponas inviti la ĉeestantajn kandidatojn prezenti sin mem.

**4.2. Prezento de kandidatoj**
Komencas **Tyron Surmon**, la nuna 2-a vicprezidanto kaj la sola kandidato por la prezidanto en la venonta estrara mandato. Li mencias siajn agadojn de la lastaj kelkaj jaroj, interalie pri sia tempo en la estraroj de JEB kaj de TEJO, kaj pri sia laboro por RETOSO. Li diras, ke li estas optimisma pri la kvanto de kandidatoj kaj ne antaŭvidas problemojn pro eventuala

malgranda mandato. Li diras, ke li ŝatus plifaciligi pligrandigon de la Estraro meze de la mandato, kiam pli evidentas la momentaj bezonoj de la teamo. Li diras, ke li eble preparos iun reglamentamendan proponon en la ĉeestas (hibrida) sesio en IJK.

Poste prezentiĝas **KuboF** kiel kandidato por ĝenerala sekratario. Li klarigas, ke en sia motivletero li ne menciis tiun ĉi pozicion, ĉar ĝi estis proponita al li nur poste fare de la EK. Tiam, post kiam li eksciis, kiel funkcias la laboro en tiu posteno, li decidis akcepti la proponon kaj kandidatiĝi por ĝenerala sekretario. Li diras, ke li preferus pli strategian laboron ol administran, sed ĉar li jam plenumis similajn administrajn taskojn en tri aliaj organizaĵoj, li pretas fari tion ankaŭ en TEJO. **KuboF** volas, ke TEJO estu platformo por junaj esperantistoj, ne nepre faru ĉion mem, sed ebligu fari diversajn aferojn al aliuloj.

La sekva sin prezentiĝanta kandidato estas **Patricio**, kandidato por la ofico de kasisto. Li diras, ke siajn ideojn pri la financoj li klarigos en la daŭrigo de lia prezentaĵo en ceteraĵoj. Li konsentas kun la ideo de Tyron pri la ebla neceso remalfermi kandidatiĝojn por la Estraro iam dum la jaro.

Sekva parolas **Snehaja Venkatesh (Snehaĝa)**. Ŝi parolas pri sia sperto kiel komisiito pri edukado, scienco kaj kulturo. Ŝi parolas ankaŭ pri sia intereso pri adoleska agado.

Atendante la sinprezenton de **Ada Florence Iracadukunda**, **Ana** faras demandon al la Elekta Komisiono kaj al **Tyron** pri la kialoj por proponi konsiston de la estraro sen Ada kaj pri la eventuala loko de nespertaj personoj en la Estraro. **Lukasz** klarigas, ke temis pri manko de sperto de **Ada**, kiu neniam antaŭe estis aktiva en TEJO. Laŭ **Lukasz** la pasintaj jaroj montris, ke tiaj personoj facile malentuziasmiĝas kaj forbruliĝas, kaj neniu intencas, ke io tia okazu. **Tyron** konsentas kun Lukasz kaj diras, ke iu sen ajna TEJO-sperto tre malfacile povas orientiĝi ene de la Estraro. Li tamen diras, ke li pretas esti konvinkita por alia opinio. **Patricio** aldonas, ke Ada efektive ne havas sperton TEJO-nivele, sed ŝi havas grandan sperton en la loka nivelo en Burundo kaj povas esti interese, kun forta mentorado, elekti ŝin al la Estraro, ĉar ŝi portos novan perspektivon al la stabo.

**Albert** ŝatus bondeziri al la nova Estraro kaj klarigas, ke pro personaj kialoj li ne povis rekandidatiĝi por la nova oficperiodo. Li rimarkigas, ke **Tyron** plurfoje gvidis kunsidojn kiel vicprezidanto kaj faras tion bone. Li aldonas, ke **Tyron** estas racia persono, kiu bone ekvilibrigis lian pli spiritan sintenon. **Tobiasz** aliĝas al la rekomendoj de **Albert** pri **Tyron**, ĉefe pro lia laboro pri AKSO kaj rilatoj kun UEA. **Patricio** kaj **Valentin Ceretto-Bergerat** same rekomendas la kandidatiĝon de **Tyron**. **Wilson** siaflanke rekomendas la kandidatiĝon de **Patricio**.

#### 4.3. Voĉdonado pri kvantoj da estraranoj kaj vicprezidantoj

**Tobiasz** proponas, ke la elekto pri la kvanto de estraranoj okazu en Centra Reto per paroranga metodo inter la sesioj, ĉar estas tri proponoj de la Elekta Komisiono, kaj ne estas facile prepari parorangan voĉdonon en Zoom.

Intertempe **Ada** sukcesis aliĝi al la kunsido kaj prezentas sin mallonge. Ŝi ripetas informojn de la raporto de la EK. Ekde 2019 ŝi estas respondeca pri virina agado kaj estis estrarano de JEBUO kiel vickasisto.

**Albert** daŭrigas la diskuton pri la kvanto de estraranoj kaj li proponas ke estu sep, ĉar kvin estas laŭ li neakceptebla kvanto, kaj ses ne estas perfekta pro sia nepareco.

**Ada** demandas, ĉu la kandidatoj rajtas voĉdoni. **Lukasz** respondas, ke ne, ke voĉdonas nur komitatanoj.

**Tobiasz** ripetas sian proponon voĉdoni en Centra Reto per paroranga metodo.

> *La Komitato decidas voĉdoni rete per paroranga metodo pri la kvanto da estraranoj kaj vicprezidantoj en la venonta Estraro, antaŭ la komenco de la dua sesio.*
> 22 personoj voĉonas jese, neniu voĉdonas nee, neniu sin detenas
> La propono estas akceptita.

**Tyron** rekomendas al la Komitato voĉdoni por 5-kapa estraro. **Patricio** esprimas sian poron por 6- aŭ 7-kapa estraro. **KuboF** diras, ke li preferas 7-kapan estraron, sed kun la nunaj kandidatoj li konsentas, ke estu 5-kapa estraro kun tasko serĉi novajn estraranojn dum la oficperiodo.

**Rafal** fermas la sesion. **Tobiasz** dankas lin pro la kunsidestrado.

**Inter la sesioj okazas kvin retaj voĉdonoj en Centra Reto:**

1. **Nombro de estraranoj (2023-2024)** [per paroranga metodo]
   *Laŭ la proponoj de la Elekta Komisiono, la Komitato aprobas la konsiston de la nova Estraro:*
   *- kvinkapa*
   ***- seskapa***
   *- sepkapa*
2. **Nombro de vicprezidantoj (2023-2024)** [per paroranga metodo]
   *Laŭ la proponoj de la Elekta Komisiono, la Komitato aprobas la konsiston de la nova Estraro kun*
   ***- unu vicprezidanto***
   *- du vicprezidantoj*

3. **Prezidanto (2023-2024)**
   *La Komitato elektas Tyron Surmon kiel prezidanton por la estrara mandato 2023-2024.*
   15 personoj voĉdonis jese, neniu voĉdonis nee, 3 personoj sin detenis
4. **Ĝenerala Sekretario (2023-2024)**
   *La Komitato elektas Michal Matúšov (KuboF) kiel ĝeneralan sekretarion por la estrara mandato 2023-2024.*
   15 personoj voĉdonis jese, neniu voĉdonis nee, 3 personoj sin detenis
5. **Kasisto (2023-2024)**
   *La Komitato elektas Patricio Agustín Iglesias kiel kasiston por la estrara mandato 2023-2024.*
   14 personoj voĉdonis jese, neniu voĉdonis nee, 4 personoj sin detenis

| **2a sesio** | 14:00-16:00 UTC |
|---|---|

| # | Tagordero | Subtemoj | Daŭro |
|---|---|---|---|
| 1 | Elektoj | Rezultoj de voĉdonoj<br>Elekto de Vicprezidantoj<br>Elekta komisiono | 30 min |
| 2 | Lastaj anoncoj pri UK kaj IJK | | 15 min. |
| 3 | Laborgrupo pri Duolingo | | 10 min |
| 4 | Lingvopolitikaj Pozicioj de TEJO | | 10 min |
| 5 | KODEJO kaj elstaraj sekcioj | | 15 min |
| 6 | Partoprenu IJK-n | La estonteco de la konkurso rilate al problemoj kun akirado de vizoj. | |
| 7 | Aktivula Trejnado | | |
| 8 | Ceteraĵoj | | 10 min |
| 9 | Fermo | | |

La sesio estas elsendata en YouTube: [https://www.youtube.com/watch?v=R9yU-rlcDCo](https://www.youtube.com/watch?v=R9yU-rlcDCo)

**0. Elekto de kunsidestro**

La sesion malfermas **Tobiasz**. Li klarigas, ke pro la kialoj jam menciitaj komence de la unua sesio, mankas kunsidestro por la nuna sesio. Tial li proponas, ke la sesion gvidu, spite la reglamentojn, li mem, se la Komitato esprimos tian volon. **Patricio** proponas, ke kunsidestro povus esti **Karlos** aŭ **Legolas (Jonas Loser)**, la volontulo. Alia eblo laŭ li estus ke iu komitatano rezignu pri sia komitataneco por la daŭro de la sesio por povi gvidi ĝin, sed li preferas, ke estu aŭ Karlos, aŭ Legolas. **Hans Becklin** proponas, ke la Komitato flankenmetu sian regulon por tiu ĉi sesio kaj permesu al la Ĝenerala Sekretario prezidi la Komitaton. **Tobiasz** demandas **Karlos** kaj **Legolas** pri ilia preteco, ili respondas, ke pro la kvalito de la retkonekto ili preferas ne prezidi la sesion. **Hans** proponas, ke simile al diversaj parlamentaj sistemoj, kie kutime ⅔-a plejmulto rajtas flankenmeti ajnan mem-establitan regulon, la Komitato nun flankenmetu la regulon pri la eksterkomitateco de la kunsidestro. **Albert** demandas pri la propona teamo, kiu estas senŝanĝa kompare al la pasinta sesio. Sekve li starigas proceduran proponon pri tuja voĉdono de la propono: pri la flankenmeto de la regulo pri kunsidestro kaj propono de Tobiasz kiel kunsidestro por tiu ĉi sesio.

> *La Komitato donas esceptokazan permeson al la Ĝenerala Sekretario Tobiasz Kubisiowski esti la kunsidestro por la dua sesio de la nuna komitatkunveno.*
> 17 personoj voĉdonas jese, 1 persono voĉdonas nee, 1 persono sin detenas
> La propono estas akceptita.

**1.1. Rezultoj de voĉdonoj**
**Tobiasz** anoncas, ke pro teknikaj problemoj el la kvin planitaj voĉdonoj nur du jam finiĝis, la restantaj tri finiĝos post dek minutoj (vd. la voĉdonojn kaj iliajn rezultojn supre). **Tobiasz** proponas unue diskuti pri la Elekta Komisiono kaj nur poste pri vicprezidantoj, ĉar post la fino de la voĉdono pri Kasisto eblas, ke restos nur unu kandidato, kio plisimpligos la voĉdonon.

**1.3. Elekta Komisiono**
**Tobiasz** demandas pri proponoj aŭ sinproponoj por la Elekta Komisiono. Mankas proponoj. **Tobiasz** resumas la postulojn kaj devojn de la membroj de la Elekta Komisiono. **Tyron**, konfronte al la manko de kandidatoj, proponas ŝovi tiun diskuton al la hibrida sesio en IJK. **Karlos** rimarkigas, ke la problemo pri la elekto de la Elekta Komisiono ripetiĝas ĉiujare, do indus havi procedurojn por normigi la elekton de la EK, ekzemple ke estu intermito inter la elekto de la Estraro kaj la elekto de la EK. **Patricio** esprimas sian esperon, ke manko de proponoj al la EK rezultas el la intenco de multaj komitatanoj kandidatiĝi por la sekva Estraro. Vicprezidanto **Valentin Ceretto-Bergerat** duonŝerce demandas, ĉu devus esti respondeco de la Elekta Komisiono proponi membrojn por la venonta Elekta Komisiono. Li ankaŭ subtenas la ideon de **Karlos**. **Tyron** faras proponon ŝovi la diskuton pri la elekto de la Elekta Komisiono al la hibrida sesio en aŭgusto.

> *La Komitato decidas prokrasti la diskuton pri la Elekta Komisiono al la hibrida sesio okazonta la 6-an de aŭgusto.*

20 personoj voĉdonis jese, 1 persono voĉdonis nee, 1 persono sin detenis
La propono estas akceptita.

**1.2. Elekto de vicprezidantoj**
**Tobiasz** anoncas la rezultojn de la voĉdonoj pri oficħavaj estraranoj. Ĉar **Patricio** estis elektita kiel kasisto, estas nur unu ebla kandidato por la sola vaka ofico de vicprezidanto. **Tobiasz** proponas voĉdoni pri tio en la kunsido. **Tyron** kaj aliaj konsentas.

*La Komitato elektas Snehaja Venkatesh por la posteno de TEJO-vicprezidanto por la venonta estrara mandato.*
16 personoj voĉdonas jese, neniu voĉdonas nee, neniu sin detenas.
La propono estas akceptita.

**2. Lastaj anoncoj pri UK kaj IJK**
**Albert** anoncas, ke en la Universala Kongreso de Esperanto en Torino estos kelkaj programeroj, en kiuj engaĝiĝos TEJO: Movada Foiro, prezento pri EJO, TEJO sin prezentas, patrona akcepto. **Albert** invitas ĉiujn helpi pretigi la programerojn kaj ĉeesti ilin.

**Albert** atentigas, ke la sesio de la komitatkunveno en IJK okazos hibride. Li ankaŭ rememorigas, ke konforme al la laste ŝanĝita reglamento komitatanoj de TEJO rajtas je 25%-a rabato je programkotizo, kaj li anoncas, ke la repagoj estos faritaj per UEA-kontoj. **Albert** anoncas, ke kadre de IJK okazos Junulara Movada Foiro kaj ke li esperas ke multnombra partopreno fare de la komitatanoj. Li invitas la Landajn Sekciojn kaj aliajn organizojn preprai siajn budojn kaj konsideri ne printi flugfoliojn, sed pli daŭripovajn metodojn por transdoni informojn. **Albert** anoncas ankaŭ aliajn programerojn kaj invitas aliajn personojn reklami siajn eventetojn. **Valentin**, **KuboF**, **Karlos** kaj **Wojtek** invitas al koncernaj programeroj en IJK. **Wojtek** kaj **Albert** anoncas, ke restas vaka loko en la teamo de helpantoj kaj en la estrado de la trinkejo.

**2'. Elekto de la ceteraj estraranoj**
Ekstertagorde **Tyron** demandas pri la eblo voĉdoni pri la ceteraj estraranoj dum la kunveno, ĉar restas nur du personoj por du senoficaj lokoj. **Hans** responde favoras la parorangan metodon kaj voĉdonon en Centra Reto. **Tyron** argumentas, ke per ordinara metodo oni povus funkciigi du apartajn voĉdonojn. Tial li proponas voĉdoni pri la ceteraj estraranoj nun.

*La Komitato decidas voĉdoni tuj pri la ceteraj estraranoj por la venonta estrara mandato per ordinara metodo.*
15 personoj voĉdonas jese, 4 personoj voĉdonas nee, 4 personoj sin detenas
La propono estas akceptita.

**Hans** demandas pri la rekomendoj kaj malrekomendoj de la Elekta Komisiono. **Tobiasz** kaj **Snehaĝa** resumas la koncernan tagorderon de la antaŭa sesio.

> *La Komitato elektas Abhinav Varma kiel senofican estraranon por la estrara mandato 2023-2024.*
> 13 personoj voĉdonas jese, 3 personoj voĉdonas nee, neniu sin detenas
> La propono estas akceptita.
>
> *La Komitato elektas Ada Florence Iracadukunda kiel senofican estraranon por la estrara mandato 2023-2024.*
> 9 personoj voĉdonas jese, 4 personoj voĉonas nee, 3 personoj sin detenas
> La propono estas akceptita.

**3. Laborgrupo pri Duolingo**
**Miguel** resumas la celon kaj la agadon de la laborgrupo pri Duolingo, kiel priskribite en la koncerna mesaĝo en la komitata listo. En la grupo membras diversaj homoj el TEJO kaj ekster TEJO. Dank' al la laboro de la grupo kreiĝis peticio ĉe change.org, kiu petas al Duolingo ne forigi la Esperanto-kursojn por franc-, hispan- kaj portugal-lingvanoj. Plia ideo estas krei filmeton kun esperantistoj de la Duolingo-generacio por defendi la kursojn. **Patricio** aldonas, ke BEJO faris grandegan laboron pri la afero.

**4. Lingvopolitikaj pozicioj de TEJO**
**Valentin** resumas la ĝisnunajn laborojn de la laborgrupo pri la lingvopolitikaj pozicioj de TEJO. Li mencias ĝisnunajn proponojn por plibonigi la bibliografion de la dokumento, kio tamen ne estas preta nun, do ne povas esti temo de voĉdono.

**5. KODEJO kaj elstaraj sekcioj**
**Patricio** dankas ĉiujn sekciojn, kiuj plenigis la formularon por la konkurso pri elstaraj sekcioj. Li aparte mencias la engaĝiĝon kaj la laboron de Germana Esperanto-Junularo kaj sendas la ligilon al KODEJO en la babilejo.

**6. Partoprenu IJK-n**
**Tobiasz** resumas la proponon de la ekskomitatano Karina Oliveira por trakti la defiojn de la konkurso "Partoprenu IJK-n" rilate al la problemoj pri vizakirado. **Snehaĝa** klarigas la situacion en Barato, kie oni devas atendi plurajn monatojn por ricevi la decidon pri la akiro de vizo. Ŝi diras, ke se TEJO anoncus la gajnintojn de Partoprenu IJK-n meze de januaro, tio donus al la gajnintoj sufiĉe da tempo por peti vizon kaj aĉeti biletojn por IJK. **Miguel** rakontas, ke eĉ sen la problemoj pri vizo pli granda anticipo estus helpa pro la pli granda fleksebleco en serĉado de taŭgaj biletoj. **Patricio** proponas komenci donackampanjon jam nun kaj havi liston de gajnintoj en decembro. **Albert**, kiel organizanto de "Partoprenu IJK-n" kaj mem civitano de lando, kiu bezonas vizon por eniri la Schengen-zonon, tute subtenas la

ideon pli frue anonci la gajnintojn. Li diras, ke nun, kun la nova sistemo de rekta organizado de IJK fare de TEJO kaj la pli stabila financa situacio, tio devus esti ebla, do li invitas la novan Estraron kiom eble plej frue okupiĝi pri la organizado de la kongreso, inkluzive de la konkurso "Partoprenu IJK-n" por lanĉi la alvokon en oktobro. **Ana** same opinias kaj diras, ke estus bone havi reglamenton pri tio, ne nur rekomendon. Ŝi rakontas ankaŭ la okazon de Snehaĝa, kiu ne povis partopreni en IJK, sed pro la konkurso povis poste partopreni en JES; ŝi proponas do establi regulojn por tiaj okazoj de transdoneblo al alia Esperanto-evento. **Ana** proponas krei laborgrupon por pripensi la eblojn solvi tiujn problemojn. **Patricio** konsentas kaj rimarkigas ankaŭ la flankon pri financigo de IJK.

> *La Komitato decidas starigi laborgrupon por pripensi solvon pri la problemoj prezentitaj de kelkaj komitatanoj rilate al la konkurso "Partoprenu IJK-n".*
> 15 personoj voĉdonas jese, 1 persono voĉdonas nee, 6 personoj sin detenas
> La propono estas akceptita.

**Ana** proponas sin por gvidi la laborgrupon kaj varbi membrojn tra la komitata listo.

**7. Aktivula Trejnado**
**Ana** reprenas la temon, kiun ŝi levis en la komitata listo, kaj proponas plilozigi la regulojn por fariĝi trejnistoj per anstataŭigo de "kaj" per "aŭ" en la listo de kondiĉoj. **Patricio** konsentas pri la direkto de la proponata ŝanĝo. **Albert** esprimas sian opinion, kiu konsentas kun la rimarkoj de Ana kaj diras, ke necesas malfermi la TEJO-trajnistaron al ekstereŭropanoj. Li levas ankaŭ la ideon de retaj eventoj TnT, kiuj ne povus esti kunfinancataj el subvencioj, sed kiuj plifaciligus la disvastigon de la reto de TEJO-trejnistoj. **Patricio** mencias la AMO-seminariojn de UEA kaj proponas lerni de ties spertoj. **Albert** rimarkigas pri kelkaj rezervoj rilate al la sekvado de la AMO-modelo pro ĝia tema diverseco kaj eble ne modela gvidado. Li mencias kelkajn kampojn, en kiuj novaj TEJO-trejnadoj povus okazi. Oni proponas plu diskuti pri tio en la hibrida sesio en IJK.

> *La Komitato decidas diskuti pri la reguloj por TEJO-trejnistoj dum la hibrida sesio okazonta la 6-an de aŭgusto 2023.*
> 18 personoj voĉdonas jese, 2 personoj voĉdonas nee, 2 personoj sin detenas.
> La propono estas akceptita.

**8. Ceteraĵoj**

**8.1. Prezento pri la administra subvencio (daŭrigo)**
**Patricio** daŭrigas sian prezenton Financaj defioj de TEJO - KoKu - 15/VII/2023 ekde lumbildo 9. **Ana** starigas demandon pri la kunfinancado de dungoj kun aliaj organizoj; **Patricio** respondas, ke lia ideo estis ekzemple uzi UEA aŭ landajn sekciojn el landaj kun malaltaj dungokostoj. **Karlos** kompletigas la prezenton de Patricio per klarigo, ke por atingi

la sojlon de 5 plentempaj dungoj necesus dungi en landoj kiel Rumanio, Hungario kaj Bulgario, kiuj havas plej malaltajn dungokostojn en la tuta Eŭropa Unio.

### 8.2. Novaj dungoj de TEJO

Uzante la temon pri dungoj, **Valentin** anoncas la laste prenitan decidon pri la novaj dungoj de TEJO: la Estraro decidis dungi David Ruiz Sanchez kiel oficiston pri eksteraj rilatoj kaj Jeanne Grimaud kiel oficiston pri komunikado.

## 9. Fermo

**Tobiasz** dankas ĉiujn komitatanojn pro la ĉeesto, aparte **Oscar** kaj **Wojtek** pro ilia laboro kiel propona teamo kaj **Rafal** kiel kunsidestron de la unua sesio. **Tobiasz** rememorigas, ke la voĉdono pri la financa raporto okazos rete kaj ke kelkaj temoj estis ŝovitaj al la hibrida sesio la 6-an de aŭgusto en IJK. **Albert** invitas ĉiujn enŝalti la kameraojn por fari komunan foton.

